

Esperanto *en Danio*

11-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2004



Semajnfina kurso en Reerslev 2004

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16

✉ dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)

Jytte Sunekær (sekretario)

Ejnar Hjorth (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Ana Røssum

Torben Svendsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 24 47 50 40

✉ eed@esperanto.dk

Presado:

Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz

Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup

☎ 32 52 19 58.

✉ ina.schultz@get2net.dk

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

10.02.2005

Enhavo

Lande

Semajnfina Esperanto-kurso 4

Fonduso Esperanto-Domo..... 5

Esperantosemajno en Klint... 6

Esperanto-biblioteko

en RUC.... 7

Danco de la derviŝoj..... 8

Nova kodisko de

Esperanto Desperado... 14

Loke

Kopenhago..... 15

Næstved..... 18

Historia Esperanto-paro..... 19

Monde

Premio “Ada Sikorska”..... 23

Neergaard en Kroatio..... 23

Japano rimarkita

en Pollando .. 24

La 6a EEU-Kongreso..... 25

UK en Vilno 2005 26

Anoncoj

RevuServo de DEA 27

La venonta jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio

okazos

La 9an kaj 10an de aprilo 2004

en Tune Landboskole
Grevevej 20, 2670 Greve

La kunvenejo situas inter Greve kaj Tune, kun trajna kaj aŭtobusa konekto al Roskilde.

Bonvolu rezervi la tagojn!

Detala programo kun aliĝilo sekvos tuj post novjaro.

Sincere, la estraro de DEA.

Semajnfina Esperanto-kurso

Dum la semajnfino 3-5-a de septembro 2004 ni partoprenis denove en kurso ĉe Anna kaj Erik Hansen en Reerslev proksime de Ruds Vedby.

Ni estis 9 partoprenantoj krom la gastigantoj. Inter la partoprenantoj estis konatuloj el lastjara kurso, kaj nekonataj, novaj membroj. Gvidanto de la kurso estis Peter Weide, kiu loĝas en Melby. Peter lernis Esperanton dum la infanaĝo. La lingvo estis natura parto de la hejma vivo. Ĉi tiu fundamento estas tre favora por instruado.

Mi partoprenis dufoje en semajnfina kurso ĉe Anna kaj Erik. Ankaŭ ĉi-jare la kadroj, kiuj estis metitaj de niaj gastigantoj, estis ege bonaj por la ĉeesto kaj la bonfarto de la partoprenantoj – kaj ĉiaokaze ankaŭ por la lernado. Ili komencis plaĉan tradicion. Ni esperas ke ĝi pludaŭros.

Anna kaj Erik bedaŭrinde ne povos daŭrigi ĝin. Nur ankoraŭ unu fojon dum la venonta somero ili gastigos la kurson, ĉar ili dum la venontjara aŭtuno translokiĝos al loĝkomunumo por pensiuloj. La loĝkomunumo estas jam parte konstruita.

Mi demandas: kiamaniere daŭrigi la bonan laboron kiun Anna kaj Erik komencis? Thea kaj mi havas proponon arangi vojaĝon per boato laŭ kanaloj en Nederlando. La vojaĝo povas daŭri kvin aŭ ses tagojn, dum kiuj ni loĝas kaj manĝas en la boato, kiu ŝipveturas de urbo al urbo. Tiamaniere ni povos kunigi instruadon, kunestadon kaj kulturajn spertojn kune aŭ individue.

Ni ĝojis partopreni la kurson, kaj mi sentis, ke ankaŭ niaj samkursanoj ĝojis. Ni ĝoje atendas la venontan kurson en la aŭtuno de 2005, kaj ni esperas ke ni sukcesos trovi novan kursformon, kiu plaĉos al ni ĉiuj.

Thea kaj Gert Rønsby.

Fonduso Esperanto-Domo

“Fonden for Esperanto-Domo” estis fondita en la jaro 1943. La kapitalo je la 31-a de decembro 2003 estas DKK 734.179,00.

Karaj samideanoj, alproksimiĝas la fino de la jaro, kaj mi supozas ke almenaŭ kelkaj el vi pripensis eventualajn impostajn avantaĝojn. Tiuj kiuj decidis subteni la Fonduson, povos laŭ la imposta leĝo (Ligningsloven §8A stk. 1.1, de novembro 2001), ricevi deprenon de imposto por sumo kiu superu 500 DKK sed supre limigita al sumo de 5 000 DKK, jare. Tio signifas ekzemple, ke se oni donacos 600 kronojn, oni povos deklari tion al sia Impostinstanco, kaj rajtas deprenon de 100 kronoj.

Sed se oni, de tempo al tempo, deziras donaceti iun pli malgrandan sumon anstataŭ grandan sumon unufojan, ankaŭ tio estus tre utila helpo al la Fonduso.

Por rememorigi ĉiujn interesotojn, la celo de la Fonduso estas aĉeti aŭ lui lokalojn, por interalie pli kvalite konservi nian heredaĵon kaj pli aktive disvolvi nian lingvon.

Kaj fine la Estraro de Esperanto-Domo kore dankas al ĉiuj ĝisnunaj kaj venontaj subtenantoj.

La ĝironumero de la fonduso estas:

4230-818843

Den Danske Bank

Fonden for Esperanto-Domo

Ana Røssum

Nova DEA-estraro

La estraranoj Peter Weide kaj Werner Madsen rezignis siajn postenojn en la estraro de DEA kaj la anstataŭantoj Bent Jensenius kaj Ana Røssum eniris kiel egalrajtaj membroj kun voĉdono. Novelektita vicprezidanto estas Ejnar Hjorth.

Esperantosemajno en Klint

Kiel kutime ni partoprenis en la Esperanto-semajno en Klint 31/7-6/8 2004. Partoprenis ĉirkaŭ 30 personoj el landoj tiel diversaj kiel Svedio, Danio, Rumanio, Pollando, Israelo, Serbio-Montenegro, Litovio kaj Nederlando. Estis tre interesa kaj ujutna semajno ĉi-jare, ĉar, por la unua fojo la Esperantosemajno okazis en la sama periodo kiel la aliaj internaciaj semajnoj en Klint. (Pasintfojojn la semajno okazis post la internaciaj semajnoj).

Do, homoj kiuj estis tie por studi la kosmologion de Martinus pere de diversaj naciaj lingvoj (oni simultane interpretas en la granda prelegejo, ekzemple de la sveda lingvo, en Esperanton, la danan, la anglan, la germanan kaj la nederlandan), nun havis ŝancon iomete aŭdi pri Esperanto, kaj aŭdi ĝin kiel vivantan lingvon. Jes... kelkaj homoj fakte ricevis inspiron komenci lerni Esperanton!

Ni ankaŭ havis bonŝancon partopreni en speciala Esperanto-kurso, kiun gvidis Sonja Petrović kaj Håkan Lundberg (Srbio-Montenegro). Ili faris kursojn kaj

por komencantoj kaj por daŭrigantoj. Ni partoprenis en speciala temogrupo kiu diskutis interalie kiel traduki la Kosmologion de Martinus el Esperanto en diversajn naciajn lingvojn, ekzemple la polan kaj la rumanan. Ni ankaŭ diskutis kaj faris ekzercadojn pri komplikaj gramatikaĵoj.

Poul Dyrholm (Danio) gvidis studgrupon, kaj multaj partoprenis tie por profundiĝi kaj en la Kosmologio de Martinus kaj en Esperanto. Ni ankaŭ aŭskultis tre interesajn prelegojn kun multe da personaj spertoj el la vivo de ekzemple Poul Dyrholm, Ole Therkelsen (Danio) kaj Rita Valčiukaite (Litovio).

Vere ili bone sukcesis kapti nian atenton, kaj ni ĝuis ĉiujn momentojn.

Mi nun volas danki al ĉiuj kontribuantoj kaj partoprenantoj, kiuj helpis fari tre agrablan, ĝojan, interesan, inspiran kaj feliĉan semajnon, kaj mi ankaŭ volas danki ĉiujn homojn, interalie Jonas kaj Mathias Dalmoose (Danio), kiuj pere de muzikado kaj kantado kaj pere

de aliaj amuzaj aferoj multe ĝojigis nin ĉiujn...

Reveninte hejmen ni nun havas tre bonajn kaj belajn memorojn,

kiuj donas al ni vivinspiron “por la tuta aŭtuno”...

Sven Friis-Jørgensen kaj Helen Claesson

Esperanto-biblioteko en RUC

Roskilde Universitetsbibliotek
Universitetsvej 1
4000 Roskilde
tel: 46 74 22 31
fax 46 74 30 90

275 libroj estas ĝia stoko. Rete ĝi estas trovebla ĉe http://www.rub.ruc.dk/rub/databaser/bog_fr.html, serĉu “esperanto”. Oni povas viziti la bibliotekon por prunti librojn, aŭ eventuale sendigi la pronton poŝte kontraŭ 50 kronoj.

Pere de *Folkebiblioteket*, ĉe www.bibliotek.dk oni povas mendi titolitajn librojn al sia loka biblioteko – tiu servo estas senpaga!

Jen iomete pri la historio de la *Biblioteko de KEK* (Kopenhaga Esperantista Klubo):

En 1944 Gustav Kühlmann ekaktivigis ĝin – post multjara vegeto – faris grandan laboron pliampleksigi la librostokon. El tio nombriĝis 1.100 libroj. Oni

kaj aĉetis kaj heredis – inter alie de LEK (Laborista Esperantista Klubo). Bibliotekisto Gerda Frellesen kaj Bodil Kühlmann kune laboris multajn vesperojn por la registrado

En 1955 regularo estis verkita. Oni kunlaboris kun la biblioteka kontrolorganizo de la ŝtato.

Ĝis 1990 la biblioteko situis hejme ĉe Bodil kaj Gustav Kühlmann. Tiam ĝi estis translokita al nia tiama Esperanto-Domo en Rosenørns Allé.

En 1999 tiu loko estis vendita, kaj Ole Blaust transprenis la taskon doni lokon por la libroj. En aprilo 2004 ni elprenis 275 librojn por pludoni al RUC. En aŭgusto la sistemo pretis por pruntado. Je via servo, bonvolu!

Jytte Sunekær

Danco de la derviŝoj

*El “Bazaro de Poeto” (1842)
de Hans Christian Andersen*

Estas sufiĉe konate, ke la turkoj, do nur la barbara parto de la nacio, konsideras ĉiujn mensmalsanulojn influitaj de dia spirito. Tial la frenezuloj havas lokon en la moskeoj, la teruraj *isaŭi* estas profunde estimataj kaj respektataj; en similan animstaton venas la derviŝoj per sia dancado, kiu estas vera sinturmento; iuspeca ebriiga radiko, kiun ili maĉadas, plifortigas la sovaĝecon.

La derviŝoj, kiuj havas sian moskeon en *Scutari*, nomiĝas “ruhanis”, tio estas “la kriantoj”; la derviŝoj en Pera portas la nomon “mevlewis”, “la turniĝantoj”; ili dancas kutime jaŭde kaj vendrede; mi vidis tiun dancadon kaj volas provi priskribi la dancojn kaj la impreson, kiun faris al mi la tuta ceremonio en iliaj monaĥejoj.

Vojaĝanto, kun kiu mi ŝipveturis al *Scutari* por vidi la derviŝojn, forte antaŭagordis mian sintenon per siaj rakontoj pri similaj dancoj de la *isaŭi*; la vojaĝanto venis de Tripolis, kie troviĝas, same kiel sur la tuta afrika marbordo, en ĉiuj moskeoj sub iuspeca gardado tuta aro de tiuj kreaĵoj; en fiksita tago de la jaro estas anoncite, ke *isaŭi* dancos tra la stratoj, kaj tiam ĉiu

fermas sian pordon, kaj neniu kristano aŭ judo riskas eliri, alie li povus – renkontante tiun sovaĝan hordon, kiu verŝajne estas sub protekto – esti vive disŝirita; hundojn, katojn, ĉiujn bestetojn, kiujn ili renkontas, ili ĝis morto disŝiras, kaj ili englutas la sangantajn pecojn.

“Mi estis ĝuste pasintjare en ĉi tiu tago de la frenezuloj en Tripolis,” diris la fremdulo, “ĉe nia konsulo mi havis lokon sur la plata tegmento de lia domo; en la tuta strato ĉiuj pordegoj kaj pordoj estis bone ŝlositaj; la hordo alproksimiĝis; eskadrono de bone armitaj rajdantaj soldatoj ĉirkaŭis la sovaĝulojn, kiuj nur portis lumbaĵon kaj cetere estis tute nudaj; iliaj longaj haroj, nigraj kiel karbono, ĉirkaŭpendis iliajn ŝultrojn. Ili faris kuriozajn saltetojn kaj eligis sovaĝajn hurlojn, senĉese ĵetante la kapon unue antaŭen, poste malantaŭen, tiel ke la longaj haroj jen kaŝis la vizaĝon, jen ĉirkaŭflugis ĝin en terura sovaĝeco; la abomenaj krioj estis akompanataj per muziko de mantamburoj kaj sakŝalmoj, kaj saltante antaŭen ili kelkfoje etendis la manojn al la strato kaj tie prenis pecojn da fajroŝtono kaj ŝiris al si per ili profundajn vundojn en brusto kaj brakoj. Ekster la domo,

kie ni staris, ni estis petintaj maŭran serviston kateni vivantan kapron, por ke ni vidu la sovaĝecon de *isaŭi*; kiam la hordo alvenis, oni ordonis al la maŭro mortigi la beston, li trapikis ĝian kolon per sia ponardo kaj tuj poste saltis malantaŭ la pordon; la kapro baraktis en sia sango, kaj en la sama momento alvenis la hurlantaj *isaŭi*, kaj unu el ili enŝovis sian manon en la sangantan vundon, hurlante levis la kapron supren, disŝiris ĝin kaj ĵetis la sangantajn intestojn al la muro de la domo. La tuta hordo sin ĵetis sur la beston kaj formanĝis ĝin komplete kun karno, haŭto kaj haroj!”

Dum ĉi tiu priskribo ni transiris Bosporus; mi citas la rakonton kiel la preludon, kiu agordis mian fantazion al la monaĥejo kaj la dancoj, kiujn mi tie vidos.

Ni estis en Scutari, urbo kun cent kvindek mil homoj, do je duono pli ol en Kopenhago, tamen ĝi estas konsiderata nur kiel antaŭurbo al Konstantinopolo; Ĉio malnova ĉi tie estas mahometana, ĉi tie loĝas, se oni rajtas nomi ilin tiel, la ortodoksaj turkoj. Du forte armitaj, duonnudaj araboj pelis siajn ŝarĝitajn kamelojn de la bordo, tra la strato, en la direkto al la granda tombejo; longa vojaĝo komenciĝis; ni sekvis kaj haltis ĉe la periferio de la urbo ĉe malriĉa, modesta domo, laŭ mia memoro kun

trabfaka murkonstruaĵo; tio estis la monaĥejo de la derviŝoj.

La pordo ankoraŭ ne estis malfermita, ni venis tro frue kaj tial iris al la proksimaj turkaj kafejoj, kiuj limas al la vaste etendita cipresa arbaro, kie ripozas la mortintoj. Ekster la kafejoj sub la verdaj foliarboj sidis aro da turkoj, militistaj kaj civilaj, parto de ili ĉeestis por partopreni la dancojn de la derviŝoj, aŭ kiel ni por rigardi ilin. Malbelega maljuna nano sidis tie, li estas fervora *ruhanis*, oni diris; mi baldaŭ vidis lin inter la dancantoj; li estis tre riĉa kaj havis dekdu belajn edzinojn en sia serajlo, sian fileton li havis kun si en la kafejo, ĉarman knabon, kiu estis same alta kiel la patro.

Finfine malfermiĝis la pordo al la monaĥejo. Ni iris tien kaj venis en grandan vestiblon, kiu estis per duone levita lana kurteno dividita en du partojn; ĝi aspektis kiel en niaj provincurboj la ŝedo antaŭ la postdomo, kie oni prezentas sovaĝajn bestojn. Ĉiu devis depreni siajn ŝuojn aŭ botojn, kaj oni vicigis ilin malantaŭ la kurteno.

Mia akompananto, la vojaĝanto, kiu estis en Tripolis, elprenis el sia poŝo paron da safianaj pantofloj, tiris ilin sur siajn botojn kaj eniris tiel, sed la turkoj rigardis lin kolere kaj interparolis; mi havis bendojn

alkudritajn en la pantalono, tial estis malfacile demeti la botojn, sed ĉar “kurbiĝu hoko laŭ postuloj de la loko“ mi prenis rapide tranĉilon, tranĉis la rimenojn kaj promenis, kiel la turkoj, en miaj ŝtrumpetoj; maljunulo kun turbano frapetis miajn ŝultrojn, kapklinis milde kaj diris ion; laŭ mia tradukisto tio signifis, ke mi estas bona homo, kiu estimas la religion kaj meritas esti turko! “Dio klerigu vin!” estis liaj lastaj vortoj.

Mi eniris nun la templon mem, se oni povas nomi ĝin tiel; ĝi formis kvarangulan salonon, supre kun bone kraditaj galerioj por la sinjorinoj, malsupre kun ronda barilo de nerabotitaj tabuloj, en ĝia interno estis la dancloko, kiu momente estis kovrita per ruĝaj, blankaj kaj blufarbitaj feloj; sur tiuj kuŝis surventre aro da derviŝoj, vestitaj kiel turkoj kutime, tamen estis ĉi tie ankaŭ multaj en la pli nova preskribita kostumo, militistaj manteloj kaj altaj, grandaj fezoj; la plankon ili tuŝis per sia frunto; kelkfoje ili levis la kapon, sed rapide, kvazaŭ io timigus ilin, ili denove klinis ĝin; mi staris en ŝtrumpetoj sur la malvarma ŝtonplanko kaj alterne metis unu piedon sur la instepon de la alia por konservi la varmon; tute ne estis agrable.

Sur la meza muro pendis en kadroj grandaj, turkaj epitafoj kaj

bildoj, kiuj prezentis konstruaĵojn; jen pendis tamburinoj, cimbaloj kaj feraj vipoj kun akraj pikiloj por sin skurĝi. Meze de la muro estis, kiel en la turkaj moskeoj, niĉo, kiu funkciis kiel altaro, kaj antaŭ ĝi staris pastro en blua talaro, verda turbano kaj kun longa, blanka barbo, li svingis incensujon kaj elbuŝigis kun stranga gorĝa sono kelkajn turkajn vortojn; nun kelkaj voĉoj komencis kanton kun ĥoro; mi diras kanton, sed tio ne estas la ĝusta vorto, ĝi estis sono, kiu formis ion strange sovaĝan, kiu alternis en diversaj ritmoj, iuspeca gamo, miriga rulado per la gorĝo, tute kiel sovaĝulo kun muzika sento, post kiam li unu fojon aŭskultis grandan bravurarion, nun volas en sia maniero imiti la lertan kanton. Aŭskulti tion estis pli timige ol en si mem neharmonie.

Post kiam la derviŝoj plurfoje estis tuŝintaj la plankon per sia frunto, ili leviĝis, kisis la manon de la pastro kaj nun ekformis duonrondon laŭlonge de la barilo, ekster kiu staris la rigardantoj.

La dancado komenciĝis; en la sama momento envenis homo, la plej teruriga, kiun mi iam vidis; du derviŝoj de Pera, rekoneblaj pro siaj altpufaj, senrandajaj feltĉapeloj, akompanis lin, li estis eremito de la regiono ĉirkaŭ Medina, diris mia tradukisto; neniam mi vidis iun homon, ĉe kiu

la frenezo tiel radiis el la okuloj, kiel ĉe tiu ĉi; la aliaj dancantoj estis antaŭe formetintaj siajn turbanon kaj fezon sur la niĉon, kaj ĉiu surmetinta blankan feltĉapelon; kun tia ĉapelo la eremito envenis, nigra, hirta hararo pendis laŭlonge de liaj dorso kaj ŝultroj; li portis blankan mantelon, sur kiu estis kudritaj per ruĝa ŝtofo du ĉevaloj kun krifoj; li ekstaris meze de la duonrondo; ĉiuj staris, kvazaŭ iliaj piedoj estus alnajlitaj, sed kvazaŭ vapormaŝino ekmovus la aliajn membrojn. Ĉiu ano moviĝadis sandirekten samtempe, unue antaŭen, poste malantaŭen, jen dekstren, jen maldekstren, kaj ĉion dum kanto aŭ litanio, aŭ kiel oni volus nomi ĝin, unue malrapide kaj poste pli kaj pli rapide, kanto samkiel movado; la dancantoj ekprenis sovaĝajn, preskaŭ obscenajn pozojn.

Du junaj turkoj kaŭris ekster la duonrondo gvidante la kantadon, kiu daŭre kreskis kun monoforma akcento je la tria silabo, la tutan parencaron de Mahometo ili trapasis de Abdallah ĝis Mohammed, kaj la ĥoro respondis “La illah! ilallah!” Ĝi sonis en la fino kiel obtuza hurlo, ronkado aŭ morta stertorado. Iuj estis mortpalaj, aliaj aspektis kiel sango, la akvo torentis laŭ iliaj vizaĝoj. La eremito deprenis sian grandan mantelon kaj staris nun en ruĝa,

lana bluzo kun longaj manikoj preter la manoj kaj kun nudaj kruroj; baldaŭ lin kaptis furiozo, kaj li disŝiris la malvastan bluzon, la nudajn brakojn li batis kontraŭ sia brusto; unu mano estis ŝrumpinta, verŝajne li mem iam kripligis ĝin; lia buŝo estis sanganta vundo; antaŭ nelonge ambaŭ lipoj estis fortranĉitaj, tiel ke la blankaj dentoj ridis, estis terure rigardi tion! lia buŝo eksangumis, liaj okuloj ruliĝadis, la arterioj en la frunto ŝvelis. La danco fariĝis pli kaj pli furioza, kaj tamen neniu eĉ unu colon flankeniĝis de sia loko. La dancantoj ŝajne ne estis homoj, sed maŝinoj, ili ne plu prononcis la vortojn, tiuj perdiĝis kiel mallongaj hurloj: “Jehova, sonis kiel Je – hú!” en la cetera litanio sonis “Ja – med!” ho helpu! plej klare. Ĝi estis kvazaŭ morta ĝemado, estis terure, kaj ju pli mi rigardis la dancantojn, des pli mi sentis min en frenezulejo inter mensmalsanuloj. “Ja – hú! ja – hú!” sonis hurlante sovaĝe.

Mia akompananto flustris al mi: “Pro Dio, ne ridu, tio estus nia malfeliĉo! ili mortigus nin!” “Ridi!” mi respondis, “ho, mi estas preta plori! estas terure, estas barbare! mi ne plu povas elteni tion!” urĝe mi serĉis la elirejon, kaj en la sama momento du el la dancantoj falis teren.

Ekstere sur la strato mi ankoraŭ aŭdis la sovaĝan hurlon: “Ja – hú! ja – hú!”

Kiel bele, kiel varme estis ekstere en la hela sunbrilo. La malpeza boato, maldika kiel ligneto, rapidis de la azia bordo al Eŭropo sur fortaj ondoj preter velŝipoj kaj boatoj; plej eta puŝo, kaj ni devus renversiĝi, sed tio ne estis en mia penso, ni venis el la nesto de teruro; ĉio estis naturo kaj vivemo.

La postan tagon mi vizitis *mewlevis*, la turniĝantajn derviŝojn en Pera; ili havas sian propran vestaĵon kaj freŝan, belan monaĥejon. Ĉio indikas, ke ili havas pli altan rangon ol *ruhanis*. En la ĉefstrato de Pera, proksime al la tombejo, troviĝas la enirejo al la monaĥejo; en la korto kreskas kelkaj altaj cipresoj. La monaĥejo mem estas apartigita de la templo-konstruaĵo, kie ili dancas.

Maljuna armeniano akompanis min tien. La korto estis plena de virinoj, la templon mem ili ne kuraĝas eniri. Tra la malfermitaj fenestroj de la monaĥejkonstruaĵo mi vidis plurajn junajn derviŝojn ekzerci la turniĝadon.

La gardostarantaj soldatoj, vidante nin resti en la korto, mansignis al ni, ke ni venu; sed niajn botojn ni devis demeti, kaj poste oni kondukis nin en la

galerion, kiu estis instalita ĉirkaŭ la salono, kaj kiu estis kovrita per tapiŝoj; ĉio ĉi tie estis pura kaj bela; la rigardo tra la malfermitaj fenestroj al Scutari kaj la malproksimaj, aziaj montoj certe iom kontribuis al la beleco; ĉiu fenestro ofertis grandiozan dioramon.

La galerio, kiun mi nun eniris, estis tute plena de turkoj, sed vidante min, fremdulon, ĉiuj tuj cedis lokon, puŝis unu la alian flanken, por ke mi facile povu veni al la barilo. Ĉi tie kaj ĉie mi devas laŭdi la ĝentilecon de la turkoj.

Nun komenciĝis la solenaĵo. Grupo da derviŝoj envenis; ili ĉiuj estis nudpiedaj, kaj ĉiu estis envolvita en granda, malhelverda mantelo; blanka feltĉapelo, verŝajne unu ulnon alta kaj absolute sen randaĵo, kovris la kapon. Unu el la plej maljunaj, kun longa, blanka barbo, ekstaris meze de la salono, krucigis la brakojn kaj legis preĝon, dum kiu sonis mallaŭta, monotona muziko, du tonoj per fluto kaj daŭre nur unu sama tono per la tamburoj, ĝi sonis preskaŭ kiel la monotona plaŭdado de fonto; la aliaj derviŝoj ĉiuj iris malrapide en rondo ĉirkaŭ la maljunulo. Nun ili deĵetis siajn mantelojn kaj staris ĉiu en malfermita, malhelverda bluzo kun longaj, mallarĝaj manikoj, longa jupo de samaj ŝtofo kaj koloro

pendis ĝis la maleoloj kaj faldiĝis ĉirkaŭ iliaj gamboj; ili etendiis la brakojn kaj turniĝis ĉiam al la sama flanko; ilia jupo staris en la aero kiel funelo ĉirkaŭ ili.


Meze de la rondo turniĝis du derviŝoj, daŭre sur la sama loko, daŭre al la sama flanko; ĉirkaŭ ili turniĝis la aliaj en kirliĝanta danco; la plej maljuna kun la longa barbo promenis kviete inter la ekstera rondo kaj la paro en la mezo. La danco devis simboli la marŝon de la planedoj.

De fermita galerio super ni aŭdiĝis mallaŭta monotona kanto; la tamburo kaj la fluto daŭrigis sian dormigan muzikon, la dancantoj daŭrigis senĉese sian turniĝadon ĉiam al la sama flanko, ĉiam en la sama takto; ili aspektis precize kiel senvivaj pupoj; neniu mieno ŝanĝiĝis, sed ili estis morte palaj.

Je forta bato sur la tamburon ili subite haltis, kvazaŭ trafita de fulmo, ili murmuris mallongan preĝon, la monotona muziko rekomenciĝis, kaj denove ili turniĝis ĉiuj al la sama flanko, kiel antaŭe, oni duonsvenis rigardante tion, ili turniĝis kaj turniĝis, nun iu

ŝanceliĝis, tiam eksonis la fluto kaj la tamburo en pli rapida tempo, kaj la ŝanceliĝanto ĉirkaŭkirliĝis ankoraŭ pli rapide, ĉiam pli sovaĝe, ĉiam pli rapide, tio ne estis eltenebla! tutan horon daŭris tiu danco; sed ĝi ne enhavis ion terurigan! oni preskaŭ povus nomi ĝin gracia; oni nur devus forgesi, ke temas pri homoj, kredi, ke estas pupoj; la danco kune kun la mallaŭta, unusona muziko donis al la tuto la karakteron de modera frenezo, kiu pli tuŝis ol skuis. Edifa oni apenaŭ povus nomi tiun tutan agadon, ĝi ŝajnis al mi kvazaŭ iuspeca baledo, dum la danco de la derviŝoj en Scutari restis en mia memoro kiel bildo de frenezulejo.

Du derviŝoj



Dervischernes Dands, En Digtars Bazar, II (1842)

El la dana: Birthe Trærup

Nova kodisko de Esperanto Desperado

Vendrede la 20an de aŭgusto aperis “**Hotel Desperado**”, la dua kodisko de la dana-pola-bosna orkestro Esperanto Desperado.

Depost la publikigo de la unua kodisko de la grupo (“Jen venas” en 2000), estis longa procezo aperigi ĉi tiun. Neniom da subvencio, malgraŭ multege da petskriboj, do oni devis muziki ĉe granda firmaa festo por pagi la surbendigon – kiu nelonge poste estis sekvestrita de la drog-polico kaj rehavigita nur meze de junio, post tri monatoj da longaj burokrataj negocoj.

14 tagojn antaŭ ol la muzikistoj rekunvenis en la studio, la muzikilo de la akordionisto estis ŝtelita survoje al prezentado de la orkestro!... (dankon al Øjvind Ougård pro prunto de akordiono). Do estas granda ĝojo nun povi prezenti ĉi tiun diskon spite al ĉiuj leĝoj de Murphy.

La kantojn verkis la membroj de la orkestro mem kaj ĝia eksmembro Denis Rock Tamba el Kongo, nun rifuĝanto en Germanio.

Esperanto Desperado ofte ludas antaŭ dana publiko kiu ne komprenante Esperanton, tamen entuziasmiĝas pro la vigla sursceneja agado de la grupo. Cetere la orkestro vive prezentiĝis en radio kaj televido, krom en festivaloj en Svedio, Francio, Finnlando, Kroatio, Hungario kaj Germanio.

Ĝenre Esperanto Desperado estas tre miksita: rokenrolo, sam-

bo, skao, regeo, hajlajfo, armena, funko, bluso, baladoj kaj cigana muziko – mallonge dirite: monda muziko. La kantoj de la disko temas pri festo, amo, milito,

malsato, sopiro, ska-muziko, vojaĝoj, dancado, revoj kaj esperoj.

La membroj estas: Kim Jezus kun akordiono kaj krioj, Amir Hadžiahmetović kun gitaro kaj Helle Eble Cleary kun fluto, krom (ne kantantaj) Brian Laustsen kun basgitaro kaj Nis Bramsen kun perkutiloj.

Pliaj informoj haveblas ĉe esperanto.dk kaj la eldonanto vinilkosmo.com.

Kim J. Henriksen (trad. JSL)



Loke

Kopenhago



Arto en Esperanto

Kio povus esti tipe Esperanta antaŭmanĝo? Kruda salmo sur sekala pano! Tion proponas francdevena Daniel Salomon kaj sveddevena Olof Olsson, ambaŭ artistoj vivantaj en Kopenhago.

“La kruda salmo similas al japana suŝio, dum la sekala pano estas skandinavia. La salmon oni marinu en italaj oliva oleo kaj bazilo, kun taja kromspico de kapsiko kaj limeto”, klarigas Daniel.

Li kaj Olof de kelka tempo laboras pri televida sitkomo kiu okazos en Esperanto, kaj tial

necesis al ili evoluigi tiajn vestaĵojn, scenografion kaj manĝaĵojn, kiujn oni imagus tipaj por Esperanto.

“Esperanto ekzistas sendepende de tempo, loko kaj naciŝtato, kaj simile nia sitkomo okazos en neŭtrala spaco, La Loko, kie manĝaĵoj, vestaĵoj, mebloj kaj lingvo estas universalaj”, rakontas Daniel.

La Lokon ĉiu povas viziti ĉiun sabaton ĝis la 4a de decembro inter 14-18a horo. Ĝis nun okazis kafejo, kurso, prelego kaj elektropopa festo, ĉiam en agrablega, multlingva etoso.

La lokon oni trovos aŭ en la reala adreso Sigerstedsgade 11, 4a maldekstre, Vesterbro, aŭ rete ĉe www.laloko.org. Ĝi jam estis dufoje menciita en la gazeto Politiken, la 29an de oktobro (pri la malfermo) kaj la 21an de novembro (pri la salmo sur pano).

“La Loko” signifas momente preskaŭ duobligon de la jam pli ol ĉiusemajnaj kunvenoj en Kopenhago. La ĉi-apuda foto el la Kultura Grupo montras la misterojn de la lingvo klarigataj per la sistemo “Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi”. Prelegas via redaktoro, asistate de Werner, Karina kaj Rasmus.

JSL



La kluboj KEK kaj DEFA-Kopenhago kunvenas en Banestyrelsen, Vasbygade 10, ĉiun lundon ekde 19.30 h. Kontaktuloj: KEK ĉe Jytte Sunekær, ☎ 4448 4726 – DEFA ĉe Lene Niemann, ☎ 4926 1319. Komuna manĝado okazas la unuan lundon de la monatoj je h 18.30. Buterpanoj mendeblas ĉe Ruth, tel 3646 6279, aŭ kunportu mem. La du kluboj ankaŭ havas komunan interretan adreson: ✉ defakek@hotmail.com

Kursoj post novjaro en la kunvenejo de DEFA kaj KEK Ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45 de la 3a de januaro ĝis la 7a de marto: (1) kurso por komencantoj, (2) legogrupo pri la fabeloj de H.C. Andersen (gvidata de Arne Casper).

Ĉiun duan lundon, je la samaj horoj, funkcias (1) studgrupo pri la libro ‘Vojago en Esperanto-lando’ de Boris Kolker (gvidata de Bent Wiinberg), kaj (2) tradukado de H.C. Andersen-fabeloj, gvidata de Lene Niemann.

Unufoje monate, je la 19a horo, okazas prelego en la Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo (KEKG) en publika kunvenejo de la biblioteko ĉe Danasvej 30B, dua etaĝo. Detaloj haveblas ĉe Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, 2720 Vanløse, ☎ 3874 9764. Interrete: ✉ kulturgrupo@webspeed.dk

Programo de la kopenhagaj kluboj

(KEK/DEFA kie ne estas indikita KEKG).

- 29 nov Kursoj. Egon prezentos prelegeton: Zenon de Elea, greka matematikisto kaj filozofo en la kvina jarcento antaŭ nia erao. Prezento kaj posta diskuto pri liaj provokaj asertoj.
- 6 dec Komuna manĝo; kursoj kaj studgrupoj.
- 11 dec KEKG 19.00-22.30: *Zamenhofvespero*. Aŭdigo de la poemo 'Prologo', 1959 de Poul Thorsen, tri paroladetoj en Esperanto kaj aŭdigo de la pritrakto de la petico favore al Esperanto en Unesko, 1954. Poste muziko, kantoj, manĝaĵo kaj trinkaĵo. **Bv. aliĝi plej malfrue la sabaton, la 5-an de decembro 2004.** Prezo: 50 kr. po persono (sen trinkaĵoj).
- 13 dec NB: jam je horo 18.00! La tradicia *JULMIKO*. Ni manĝos abundan manĝaĵon konsistantan el diversaj varmetaj kaj malvarmaj pan-surmetaĵoj – ankaŭ por vegetaranoj – kaj la vespero estos plena de ujutno, kantoj kaj ebla paroladeto. Muzike Kim gvidos nin. Ĉio tio kostos po 60 DKK + trinkaĵoj je kutimaj malaltaj prezoj. Aliĝo necesas en la klubejo aŭ **plej malfrue la 7-an de decembro** al Karen, tel 5572 7377.
- 3 jan Komuna manĝo; kursoj kaj studgrupoj.
- 10 jan Kursoj. Kantvespero – ni prenos la verdan kantaron kaj eble ion aldonos al ĝi.
- 17 jan Kursoj kaj studgrupoj.
- 18 jan KEKG *1954 – 10.12 – 2004*: La 50-jara datreveno de la Montevidea rezolucio favore al Esperanto. Parto II (1953-54). Mogens Rude Andersen rakontos la duan parton de la historio malantaŭ la ekriklato inter Esperanto kaj Unesko.
- 24 jan Kursoj. La bapto de Caro Vladimir - tria kanto
- 31 jan Kursoj kaj studgrupoj
- 2 feb KEKG *La sveda verkisto Astrid Lindgren kaj ŝiaj verkoj*. Prezento fare de bibliotekisto Kerstin Rohdin.
- 7 feb Komuna manĝo; kursoj kaj studgrupoj

- 14 feb Kursoj. *Ĝeneralkunveno de KEK* – tagordo en *Kontaktilo*. Por la ceteraj studgrupanoj okazos io alia samtempe.
- 21 feb Kursoj. Je horo 21.00 DEFA Kh membrokunveno – tagordo en *Dana Fervojisto*.
- 28 feb Kursoj kaj studgrupoj.
- 2 mar KEKG *La ciganaj lingvo kaj kulturo*. Prelego de Stalislav Mielczarek.
- 30 mar KEKG: 'Paroladetoj okaze de 5-jara datreveno de KEKG'

Zamenhofa festvespero en Kopenhago

Omaĝe al D-ro L.L.Zamenhof kaj memore al la 50-jara datreveno de la Unesko-rezolucio, Montevideo, 1954, la Pola Ambassadejo, kunlabore kun Dana Esperanto-Asocio, invitis la membrojn de Konversacia Esperantista Klubo, Dana Esperantista Fervojista Asocio, kaj Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo - al solena vespera aranĝo en la Pola Ambassadejo la 15-an de decembro. La programo konsistos el paroladetoj interpretataj en la polan, deklamado de poemo kaj muziko.

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tel 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk.

La kunvenoj okazas principe ĉiun duan vesperon en Grønnegades kaserne, Grønnegade 10, lokalo 111, ekde h 19.30.

Okazos:

Krom pri la kristnaska aranĝo vendrede la 10an de decembro – fakte la 50a datreveno de la fama rezolucio de Unesko en Montevideo favora al Esperanto – ni ne findecidis pri estontaj aranĝoj.

Kompreneble ni daŭre renkontiĝos vendrede, sed ne ĉiusemajne! Ni daŭrigos la trakton de tradukado de H C Andersen-fabeloj por establi hejmpaĝon pri ili, kaj krome ni intencas okazigi danlingvajn prelegojn – destinitajn precipe al la 'ekstera' publiko –

la vendredojn 28.01., 25.02. kaj 18.03. Ĝeneralan kunvenon de la Unuiĝo ni intencas okazigi la 18an de februaro 2005.

Okazis:

Ni somerekskursis la 26-an de junio al Lolland, kaj la 17-an de septembro vizitis nin tri bulgaroj kaj iliaj danaj gastigantoj. Poste ni daŭrigis la laboron pri tradukoj de H.C. Andersen-fabeloj, kaj la 29an de oktobro Hans Jørgen Kristensen – antaŭa esperantisto – rakontis al 26 personoj siajn travivaĵojn dum vojaĝo de la ĉina ĉefurbo Pekino al rusa Moskvo, vojaĝo de 9288 km dum 18 tagoj. Kiam ĉi tiu raporto estas legata, ni la 19an de novembro aŭdis pri la travivaĵoj de Jan kaj Lene Niemann dum vizito en Svalbard, kie ili finfine vidis polusan urson.

E. Henning Olsen

Historia Esperanto-paro

Birthe Lapenna konsentis iom rakonti pri siaj gepatroj, Kirsten kaj Peter Zacho, gravaj figuroj en la dana Esperanto-movado post la milito:

Mia patrino Kirsten Zacho naskiĝis la 25-an de septembro 1913 en Verninge, Danio. En 1934 ŝi edziniĝis al Peter Zacho kaj havis du filinojn, min kaj mian fratinn Lone, kaj edukis nin kiel denaskajn esperantistojn. Ŝi kaj ŝia edzo, Peter, ambaŭ mezgradaj instruistoj, lernis Esperanton en 1937. Nur kelkajn jarojn poste ili translokiĝis al Kopenhago, kie ili multe laboris por la Internacia

Lingvo, i.a. instruis la lingvon, verkis multajn artikolojn en Esperanto kaj en la dana, ekzemple kronikojn al la ĉefaj gazetoj de Danio, ktp. Dum la tuta vivo multaj sciencistoj, verkistoj, artistoj k.s. vizitadis la Zacho-hejmon.

La konversacia klubo

En 1953 miaj gepatroj, kune kun Poul Thorsen, H.V. Rasmussen k.a., fondis unu el la plej rekonataj Esperanto-kluboj, nome “Komuna (poste Kleriga) Konversacia Klubo” (KKK), kiu poste kunfandiĝis kun la “Studenta Esperanto-Klubo” sub la nomo

KKK/SEK. Inter aliaj konataj membroj estis Torben Kehlet, eldonisto, D-ro Paul Neergaard, la posta vicprezidanto de Akademio de Esperanto, Sven Ziegler, la nuna prezidanto de la Alta Kortumo de Danio, kaj la poste mondkonata astronomo, Prof. D-ro Erik Høg. La du lastaj nun estas membroj de la “Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna”.

Kun mallongaj interrompoj Kirsten Zacho estis prezidanto de KKK/SEK ĝis sia forpaso. Ŝi fondis (kune kun Poul Thorsen) kaj gvidis la eldonejon KOKO, kiu eldonis valorajn Esperanto-librojn kaj disdonis la literaturan premion “La Arĝenta Sprono”. La sidejo de KOKO estis en ŝia propra hejmo, Randbølgevej 4, Kopenhago F.

La klubkunvenoj de KKK ĉiam estis tre interesaj. Iam Kirsten Zacho iniciatis internacian enketon, al kiu multaj konataj esperantistoj kontribuis. Dum sia periodo ŝi inspiris la tutan Esperanto-vivon en Kopenhago, kiu ĉefe dank’ al ŝi tiam estis tre vigla. Ekzistis multaj Esperanto-kursoj kaj pluraj kluboj: “Konversacia Esperantista Klubo” (KEK), “Laborista Esperanto-Klubo” (LEK), “Dana Esperantista Fervoja Asocio” (DEFA) kaj KKK/SEK. Ili fondis Komun-komitaton, kiu organizis plurajn komunajn aranĝojn dum la jaroj.

Preskaŭ ĉiam K. Zacho venis al la komitatkunsidoj kun preta propono pri programo, kiun la aliaj kun ĝojo akceptis, i.a. vesperoj kun konataj geaktoroj kiel ekz. la direktoro de la Internacia Arta Teatro (IAT), la jugoslavo Srdjan Flego, kaj la polino Karina Waśkiewicz.

Ĉiujare, ofte kun la Komun-komitato, ŝi aranĝis brilajn Zamenhof-festojn en belaj salonegoj de Kopenhago kaj viglajn somermezajn festojn en sia privata hejmo – kelkfoje internaciajn. Dum kelkaj jaroj Kirsten Zacho estis Komitatano C de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Redaktoro de ĝia organo, la revuo “Esperanto”.

La Zamenhof-festo



Okaze de la centjariĝo de Zamenhof en 1959, Kirsten Zacho organizis la plej imponan Zamenhof-feston de la mondo en la Palaco Grafo Moltke, Kopenhago (v. “Memorlibro pri la

Zamenhof-Jaro”, 1960). Partoprenis kaj parolis la ĉefministro de Danio, la ministro de internaj aferoj, la ŝtata konsulento de la ministerio de edukado (la posta ministro de edukado), profesoroj, ambasadoroj, kulturataŝeoj kaj aliaj diplomatoj el plej diversaj landoj, la inspektoro de la edukado de la gimnazioj, la prezidanto de ĉiuj lernejkomisionoj de Danio, diversaj parlamentanoj, advokatoj kaj juĝistoj de la Supera Kortumo, la ĉefo de la Ŝtata Biblioteko, la direktoro de la programoj kaj la programsekretario de la Dana Radio, kiu poste elsendis raporton de la festvespero, kiu daŭris 25 minutojn, kaj multaj aliaj eminentuloj de la oficiala vivo.

Ivo Lapenna faris la Festparoladon (laŭ lia deziro mi deklamis poemojn de Zamenhof meze de lia parolado). Pluraj el la oficialuloj estis tiel impresitaj, ke ili restis dum la posta bankedo kaj balo. Ĉeestis pli ol 300 personoj.

La kongresoj

La UK en Kopenhago, 1962, ankaŭ estis organizita de Kirsten Zacho, la vicprezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK), kaj ŝi estis ĝia “motoro”. La prezidanto de LKK estis D-ro Paul Neergaard, la tiama vicprezidanto de Akademio de Esperanto.

Pro la groteskaj okazintaĵoj dum la UK en Hamburgo, 1974, Kirsten Zacho, kiu en tiu periodo ne estis tre forta, tiel ŝokiĝis, ke iom post iom ŝi perdis siajn lastajn fortojn kaj forpasis jam la 17-an de januaro 1975 en Kopenhago (v. la nekrologon pri ŝi en la hispana “Boletin”, marto-aprilo 1975, verkita de Ivo Lapenna – ŝia posta bofilo). Por kompletigi la bildon de Kirsten Zacho oni emfazu, ke de sia lito ŝi aktive partoprenis la proteston kontraŭ tiuj eventoj. Nek ŝi nek Peter Zacho – nek amaso da aliaj sinceraj esperantistoj – povis imagi, ke tiaj aferoj povas okazi en demokrata kaj humanisma movado.

La viro malantaŭ la virino



Peter Zacho naskiĝis la 28-an de majo 1911 en Århus, Danio. Kiel sia dinamisma kaj vigla edzino, Peter Zacho same entuziasme laboris, sed iom pli kaŝe. Pere de personaj kontaktoj li influis multajn homojn. Li verkis

sennombrajn artikolojn en Esperanto kaj en la dana, i.a. ankaŭ kronikojn en la ĉefaj gazetoj de Danio. Li tradukis H.C. Andersen kaj la konatan danan filozofon kaj verkiston Martinus.

Foje li gajnis konkurson inter ĉiuj danaj instruistoj de Danio. Temis pri filozofia traktaĵo, kaj li skribis pri Martinus. La ŝtato pagis por li kaj la edzino ok-tagan restadon en kongrescentro, la kastelo "Hindsgavl", kie ili pasigis agrablajn kaj tre interesajn tagojn kune kun la tiam Registararo. Estis karakterize por Peter Zacho, ke liaj du "idoloj", Martinus kaj Ivo Lapenna, rigardis lin kiel intiman amikon. Lia korespondado kun esperantistoj el la tuta mondo estis tre ampleksa. Speciale li helpis kaj kuraĝigis multajn homojn en la tiamaj orientaj landoj.

Horizonto kaj Perspektivo

Peter Zacho estis kunaŭtoro de kelkaj libroj en Esperanto kaj en la dana. Li estis la ĉefa "motoro" de la protestaj agadgrupoj, kiuj establiĝis tuj post UK en 1974. Lige al tio li havigis siajn proprajn presejon kaj eldonejon "Perspektivo". Interalie li eldonis sian propran periodaĵon "Perspektivo" kaj de 1981-1987 la internacian, kulturan kaj informan revuon

"Horizonto", kies ĉefredaktoro estis Ivo Lapenna. Krom tio multajn Esperanto-broŝurojn, ekz. "Memore al Ivo Lapenna" (1988), kaj la gravegan socipolitikan kaj historian libron de Ivo Lapenna: "Hamburgo en Retrospektivo" (1977). Ekde 1976 li partoprenis ĉiujn Konferencojn de la Neŭtrala Esperanto-Movado, poste la "Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado" (ICNEM), (prez. Ivo Lapenna). Li estis dum kelkaj jaroj ĝia sekretario-kasisto kaj aktive partoprenis ĉion.

La 15-an de decembro 1984 oni festis la 75-jaran naskiĝtagon de Ivo Lapenna en la Palaco Grafo Moltke, Kopenhago. Dum tiu belega festo Peter Zacho kaj D-ro Paul Neergaard donacis kaj transdonis al Ivo Lapenna la ĵus establitan de ili "Fondaĵo Ivo Lapenna".

Peter Zacho daŭrigis sian verkadon esperante, ke la komplotintoj de la UK en Hamburgo, 1974, fine komprenos, ke ili progresigos Esperanton nur per historia sincereco ... Peter Zacho, la bopatro de Ivo Lapenna, forpasis la 12-an de decembro 1991 en Kopenhago.

Oftege li citis la vortojn de L.L. Zamenhof: "Kiam ni mem volas scii, ĉu nia afero progresas aŭ ne, ni devas esplori la faktojn *internajn*."

Premio “Ada Sikorska”

En Salou (Katalunio, Hispanio) la 4-an de oktobro estis unuafoje asignita la internacia Premio “Ada Sikorska Fighiera”. Ĝin ricevis Augusto Casquero el Valencio pro la plurjardeka sindediĉa agado por Esperanto en diversaj landoj kiel kurs-gvidanto, preleganto, organizanto de multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj.

La transdono okazis en la kadro de la 12-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo, malfermita de loka urbestro: cento da esperantistoj el ses landoj partoprenis en la Semajnaj programoj (prelegoj, debatoj kaj ekskursoj). La venonta ĉiujara premio, dediĉita je la memoro de Ada – kiu dum 35 jaroj redaktis kaj eldonis la tiam sendependan “Heroldo de Esperanto” – estos asignita en aŭtuno 2005.

Neergaard en Kroatio

Revuo por nuntempa arto VIVO DE ARTO eldonata de la prestiĝa kroata Instituto por arthistorio publikigis en sia numero 71-72 fakan artikolon pri la skulptaĵo de Jesper Neergaard starigita okaze de Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo en 2001 sur Kennedy-placo.

La artikolo venas el la plumo de renoma arthistoriisto s-ino Mladenka Solman. La dulingva, kroata kaj angla artikolo kun pluraj fotoj “La skulptaĵo de Jesper Neergaard – strukturoj kaj signifoj” akcentas la altajn artismajn valorojn de la verko La Futuro. La laboro de Kroata Esperanto-Ligo en la kampo de kulturo ligiĝas en la volumo de la revuo kun la aliaj signifaj kontribuoj en plastika arto en Kroatio, kio konsiderinde kontribuas al la prestiĝo de la asocio.

S. Štimec

Japano rimarkita en Pollando

La 25an de septembro, en la pola gazeto “Rzeczpospolita”, grandformata, probable la plej aĉetata en Pollando, aperis grandega artikolo pri Esperanto. Du trionojn de tiu granda paĝo okupas intervjuo de la pola ĵurnalisto-esperantisto Roman Dobrzynski al la japana industriisto, esperantisto, Etsuo Miyoshi, “reĝo de la gantoj”, titolita “Kial mi investas en Pollando”.

En ĝi amplekse Etsuo Miyoshi klarigas kiamaniere, pere de la kunlaboro kun la polaj esperantistoj, li malfermos novan fabrikon en Pollando. Krome kaj ankaŭ tre amplekse li parolas pri Esperanto.

En la tria triono de la paĝo aperas ampleksa informo pri Esperanto, verkita de Pola Esperanto-Asocio, kie ankaŭ aperas la adreso kaj telefonnumero de tiu pola asocio.

Tiu artikolo havis grandegan efikon. Amaso da poloj legis ĝin, agrable surpriziĝis

sciigate, eble unuafoje, kio estas Esperanto, kaj vidante kiajn avantaĝojn ĝi havas, interalie por krei industriojn en Pollando, ege bezonataj, ĉar tiu fabriko estos konstruita en la bela kaj historia urbo Malbork, kie la senlaboreco atingas 30%.

En la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo okazis tuj poste studadsesio, kaj al la inaŭguro venis kelkaj ĵurnalistoj, kiuj volis havi pli da informoj pri Esperanto, kaj poste aperis diversaj artikoloj en polaj gazetoj, eĉ kun fotoj de la gestudentoj kaj profesoroj, kaj okazis kelkaj intervjuoj en radio, kaj eĉ informoj en televido.

La artikolo en Rzeczpospolita estis ege bone kaj lerte prilaborita de Roman Dobrzynski, kaj certe la opinio pri Esperanto, kiu ĝenerale ne ĉiam estas tro positiva en Pollando, ĉefe pro manko da informoj, draste ŝanĝiĝis. Rezultoj certe baldaŭ venos.

Augusto Casquero

La 6a EEU-Kongreso

La 6a Eŭrop-Unia Esperanto Kongreso okazis la 25-29-a de aŭgusto en Bilbao. Ĉeestis 284 partoprenantoj el 24 landoj, inter ili 14 danaj esperantistoj. La programo ofertis plurajn altnivelajn prelegojn, precipe vidpunktojn pri Esperanto en la Eŭropa Unio, sed ni ankaŭ konatiĝis kun la Esperanta agado en Eŭskio kaj Bilbao.

Dum la vesperoj la al ni tre konataj fratoj Jonas kaj Mathias Dalmose muzikis, kaj oni ankaŭ havis okazon konatiĝi kun danco de junulina grupo de Pollando. La ekskursita tago prenis nin al la fama urbeto Guernica, kies parlamenton ni vizitis, kaj ni revenis al Bilbao veturante laŭ la marbordo kaj vizitante urbetojn Bermea kaj Portugaleta. Mi konstatis ke Bilbao estas tre bela urbo, kun tre ĉarma malnova urboparto kaj


la Guggenheim-muzeo (surfote) estis vere mirinda konstruaĵo. Dum la urba ekskurso ni vizitis ankaŭ la sidejon de la Esperanto-klubo de Bilbao.

Dum la Kongreso kunvenis la reprezentantoj de la aliĝintaj

landoj por diskuti pri la agado de EEU, pri la statuto, la agado de la Brusela Komunikadcentro, kaj pri la anoncoj, kiujn la japana

mecenato Etsuo Miyosi malavare pagas por plivastigi la konon de nia lingvo en diversaj Eŭropaj landoj.

La komitato decidis ke EEU havu juran personecon laŭ la belga leĝo kaj oni aprobis la novan statuton. La celo de la asocio estas ĉefe kunordigi kaj vigligi la agadojn de la esperantoparolantoj de Eŭropo, speciale ĉe la politikaj kaj kulturaj instancoj de EU, kaj



krei kondiĉojn favorajn al la progreso de tiuj agadoj. La asocio konsistas el esperantaj landaj asocioj de Eŭropa Unio, kaj la reprezentantoj de la efektivaj membroj rajtas partopreni la ĝeneralan Asembleon de EEU kun decidpova voĉo. La Ĝenerala Asembleo decidas pri la aliĝo de novaj membroj.

Pri la membrokotizo la komitato decidis ke ĝi estos 50 cendoj je ĉiu membro de la

respektivaj landaj asocioj, sed oni instigu siajn membroj fari donacojn al EEU. Kiel prezidanto kaj vicprezidanto restas Sean O’Riain kaj Flory Witdoeck, kaj oni novelektis Zlatko Tišljar kiel kasiston. La periodo de la estraro estas trijara kaj dum la UK en Vilno oni elektos novan estraron. Oni decidis ke la 7-a Kongreso okazos en 2007 en Maribor (Slovenio).

Ileana Schrøder

UK en Vilno 2005

Atentu ke jarfine **plialtiĝos la kotizoj** por partopreni UK (la Universalan Kongreson de Esperanto) en Litovio, 23-30-a de julio venontjare! Se vi pagos nun, vi ŝparos preskaŭ trionon de la prezo. Kaj nun ke vi jam havas la monujon enmane, kial ne membriĝi en UEA venontjare? Interalie tio ankaŭ donas sentebelan rabaton en la UK-kotizo.

Kiom do kostas? Nu, ĝis la 1-a de januaro nemembro de UEA devas pagi 1435 kr. por aliĝi al UK. Pagante 165 kr. oni ricevas la jarlibron de UEA kaj devas pagi nur 1135 kr. por aliĝi al UK (entute do 1300 kr.). Homoj naskitaj de post 1975 pagos nur 165 kr. por membriĝi en TEJO, la junulara fako de UEA, kaj TEJO-membroj pagas nur 568 kr. por partopreni UK!

Precizigajn demandojn kaj la kotizojn por UEA kaj por UK vi povas sendi al la Ĉefdelegito por Danio:

Bent Wiinberg, Nældebjerg Allé 30, 2670 Greve.

Telefono 4390 4201, ĝirokonto 1-001-9621.

Retadreso teo@post11.tele.dk.

Anoncoj

RevuServo de DEA

Rapide alproksimiĝas la jaro 2005, kaj jam estas tempo mendi revuojn. La Revu- kaj LibroServo de DEA plilarĝigas la sortimenton kiel montriĝas ĉi-sube.

Se vi deziras aboni, skribu aŭ telefonu por ĝiropagilo – sed bonvolu memori ke la limdato por enpago estos

la 10-a de decembro 2004

– post tiu dato ne eblos al ni transigi la sumojn antaŭ la 31-a de decembro. Antaŭdankon!

Kontaktu min telefone per la numeroj 3920 6348 aŭ 2140 8487, aŭ rete per la adreso arne-casper@email.dk.

Pagante, bonvolu uzi la kodo(j)n:

| Kodo | Nomo | Abonprezo |
|------|----------------------------|---------------------------|
| LE | La Espero | 170.- DKK |
| Fon | Fonto | 225.- DKK |
| NV | Naturista Vivo | 110.- DKK |
| GAZ | La Gazeto | 210.- DKK (por 6 numeroj) |
| HdE | Heroldo de Esperanto | 250.- DKK |
| IN | Inter Ni | 135.- DKK |
| LJ | La Jaro | 40.- DKK (1 numero) |
| JA | Juna Amiko | 110.- DKK |
| LKK | La Kancerkliniko | 170.- DKK |
| Kom | Komencanto | 115.- DKK (130.- aere) |
| Kon | Kontakto | 145.- DKK |
| LF | Literatura Foiro | 235.- DKK |
| LS | Litova Stelo | 105.- DKK |
| Mon | Monato | 330.- DKK (370.- aere) |
| OdE | Ondo de Esperanto | 205.- DKK |
| Oom | Oomoto | 80.- DKK |
| TT | Tejo Tutmonde | 75.- DKK |
| IPR | Internacia Pedagogia Revuo | 140.-DKK |

Arne Casper



Amalienborg, juli 2004

*Hans Kongelige Højhed Kronprinsen og Hendes Kongelige Højhed
Kronprinsessen har bedt mig takke hjerteligt for bøgerne og den venlige
lykønskning, som det glædede Kronprinsparret at modtage i anledning af
brylluppet.*

J. Thom
Hofchefen

*Ĉi tiun dankokarton DEA ricevis de la reĝa kortego pro
librodonaco okaze de la edziĝo de la kronprinco. Pripensu ankaŭ
vi ĝojigi iun per donaco de esperantaĵo – ĉu okaze de geedziĝo,
Zamenhof-tago, kristnasko, ĉu de iu ajn festo aŭ datreveno! Nia
libroservo avide atendas viajn mendojn!
Aĉetu, ekzemple, “Hotel Desperado”, la lastan diskon de ĉi tiu
kvino: Esperanto Desperado.*

